

Sabine Fiedler

La nuna stato de studoj kaj esploroj en Esperanto kaj Interlingvistiko

(Prelego dum la Nitobe-simpozio 2018)

1 Enkonduko

La tasko de tiu ĉi prelego estas rigardadi Esperanton en la kunteksto de la sciencoj, prilumi la evolustaton de Esperanto kiel fako kaj de Interlingvistiko kiel tiu disciplino, kiu okupiĝas pri ĝi. Temas do ĉefe pri superrigardo pri Esperanto kiel esplorobjekto, inkluzive de terenoj jam bone studataj kaj terenoj, kiuj urĝe bezonas esploron. Krome la prelego prezentas studokazon pri la traktado de Esperanto kaj planlingvoj en la faka literaturo pri lingvistiko kaj socilingvistiko. Ĝi finiĝas per tri proponoj por estonta orientiĝo de interlingvistika esploro en universitatoj: (1) Esplorado pri Esperanto metu sian fokuson je la efektiva uzo de la lingvo en aktiva kaj evoluanta komunumo. (2) Post komunika historio de pli ol 130 jaroj la variaĵo de Esperanto (inkluzive de tiu sur la diakrona ebena) estu en la centro de la intereso. (3) Por plifortigi la agnoskon de Esperanto kiel esplorkampo, ĝi estu rigardata kiel ‘unu lingvo inter aliaj’ sub esplorado kadre de ĝeneralaj universitataj programoj kaj projektoj. La prelego servu kiel elirpunkto por plani la estontan laboron sur la kampo “Esperanto kaj Universitato“, al kiu la simpozio estas dediĉita.

2 La loko de Esperanto en la scienca pejzaĝo

Estas verŝajne ĉefe du disciplinoj aŭ fakoj, kiuj precipe gravas, se temas pri enordigo de Esperanto en la sciencojn: unue lingvoplanado aŭ lingvoplanado kaj lingvopolitiko laŭ nia hodiaŭa kompreno (LPP) kaj due interlingvistiko.

Lingvoplanado kompreneble gravas, ĉar Esperanto estas planlingvo. La termino planlingvo estas traduko de la germana „Plansprache“, kiun Eugen Wüster, la kreinto de terminologia scienca, enkondukis en sia doktora disertaĵo en 1931. La historio estas verŝajne sufiĉe konata, inter alie el la verko de Detlev Blanke (1985): Otto Jespersen en sia libro „An international language“ 1928, London, en kiu li priskribas sian propran planlingvan sistemon „Novial“, uzis „constructed language“ (konstruita lingvo). Tiu termino estis tradukita al „konstruierte Sprache“ en la germanlingva versio de la verko (traduko de Auerbach 1928, Heidelberg). Ĝi strangan apudsencon de „artafekta“ aŭ „afektita“, kial Eugen Wüster malakceptis ĝin preferante „Plansprache“ (planlingvo-n). Kvankam la termino tute ne estas ideala (la genezo de lingvo – ke ĝi estas planita aŭ konscie kreita – ja nenion eldiras pri la taŭgeco aŭ esprimivo de lingvo), en la germana kaj Esperanto „Plansprache/planlingvo“ intertempe akiris ĝeneralan akcepton. En la angla mi kutime enkondukas ĝin menciante sinonimojn („planned languages [also called ‘constructed language’, ‘auxiliary languages’, or ‘artificial languages’]“). Menciindas ĉi-rilate eble, ke lastatempaj publikigaĵoj (ekz. tiuj de Michael Gordin, James McElvenny, Roberto Garvía, aŭ Stephen Anderson et al.) ne uzis „planned language“.

Planlingvoj, laŭ la difino „konscie kreitaj lingvoj por faciligi la internacian komunikadon inter malsamlingvuloj“ (Blanke 2018: 26), estas ligitaj al la disciplino de lingvoplanado, ĉar ili estas produkto de lingvoplanado. Kion jam skribis Jan Baudouin de Courtenay (1908: 10), nome ke inter la transformado nur de unuopaj lingvaj detaloj kaj la transformado de tuta lingvo ekzistas

nur laŭkvanta kaj ne laŭkvalita diferenco,¹ estis konfirmita de modernaj reprezentantoj de lingvoplanado, kiel ekzemple de Valter Tauli (1968), kiu konsideras la kreadon de planlingvoj parto de lingvoplanado:

„LP [Language Planning] is the methodical activity of regulating and improving existing languages or creating new common regional, national or international languages. LP comprises all spheres of the oral and written form of the language: phonology, morphology, syntax, lexicology (...) and orthography“ (Tauli 1968, 27, kursivigo en la originalo).

Planlingvon do oni povas rigardi kiel plej ekstreman formon de lingvoplanado kaj kiel Tonkin (2015) konvinke montras en sia artikolo „Language Planning and Planned Languages: Can Planned Languages Inform Language Planning“, la scienca fako de lingvoplanado povas lerni multon el la evoluo de Esperanto kaj de aliaj planlingvoj. Tion jam montris la personeco de Eugen Wüster, kiu evoluigis la fundamenton de la ĝenerala terminologi-scienco sub la influo de sia okupiĝo pri planlingvoj.

La dua disciplino estas Interlingvistiko, fako, kiun oni komprenis kaj difinis diversmaniere. Ampleksajn superrigardojn pri la diversaj aliroj donis Schubert (1989), Sakaguchi (1998) kaj Blanke (multloke, laste 2018). Mi tiujn ne volas ripeti. Malgraŭ ĉiuj diferencoj, esploristoj tamen samopiniis pri tio, ke la ĉefa esplorobjekto de Interlingvistiko estas planlingvoj. Kiam ni okupiĝas pri tiuj, pri planlingvoj kaj kiel dum tiu simpozio precipe pri la ĝis nun plej sukcesplena inter ili – Esperanto – ne sufiĉas studi nur la lingvan sistemon. Oni same okupiĝu pri la uzado de la lingvo pere de parolkomunumo, pri komunikado de en tiu lingvo kaj la kulturaj produktoj en tiu lingvo.

Se mi rajtas por momento ĉerpi el la spertoj en Germanio: La germana faka societo „Gesellschaft für Interlinguistik (GIL)“ (Societo pri Interlingvistiko) (www.interlinguistik-gil.de) havas sufiĉe vastan komprenon pri interlingvistiko kiel scienca fako kiu studas demandojn de internacia komunikado. Tio inkluzivas la rolon de diversaj lingvafrankaoj, ne nur de Esperanto kiel planlingvo. Laŭ nia interdisciplina aliro, krom lingvistikaj demandoj, ankaŭ kulturaj, ekonomiaj kaj lingvopolitikaj aspektoj estas studataj. La ĉefa esplorprojekto ankaŭ de GIL estas planlingvoj, planlingvoj laŭ la supra difino. Tiu emfazo ŝajnas necesa al mi pro kelkaj lastatempaj forŝoviĝoj ene de interlingvistiko al la direkto de la lingvoprojektoj kreitaj por filmoj, la sciencfikcia kaj fantasta literaturoj, komputilaj ludoj k.s. La popularscienca libro de Arika Okrent (2009), kiu traktas egale Esperanto, Loglan, Volapük, la sistemojn de Wilkins, Bliss, la Klingonan, la modernan hebrean kaj aliajn, multon kontribuis al la situacio, ke ofte ne estas diferencigata inter tiuj. Ĉiuj tiuj lingvoj, projektoj kaj kreaĵoj estas interesaj el interlingvistika perspektivo, interalie ĉar ekzistas stimulaj kontaktpunktoj inter ili, kiel mi aliloke montris (Fiedler 2011). Dum la instruado de interlingvistiko² kaj aranĝoj pri inventitaj lingvoj³ oni krome rimarkas, kiom alloga la temo de lingvoinventado estas por

¹ „Między przekształceniem pewnych tylko szczegółów językowych a między przekształceniem całego języka zachodzi różnica jedynie ilościowa, nie zaś jakościowa.“

² La instruprograme de la filologia fakultato de la Universitato de Leipzig enhavas interlingvistikan modulon, kiu konsistas el prelego ("Linguistic Communication in Europe: Debates and Possible Solutions"), seminario („The Multilingual Challenge“) kaj Esperanto-kurso. Du instruhoroj estas dediĉita al konstruitaj lingvoj, kiel la Klingona aŭ la kreaĵoj de Tolkien (kp. la priskribon de la modulo en la angla en *LPLP* 32(3) kaj en Esperanto en IpI 65, Fiedler 2008a kaj b)

³ Ekz. prelego de la kreinto de la Klingona, Marc Okrand, „Linguistics and Science Fiction: An Introduction to Klingon“ la 27-an de majo 2008 en la Leipzig-a universitato.

studentoj. Tamen la t.n. Holivudaj lingvoj (Gobbo 2015a), ja neniam estis kreitaj „por faciligi la internacian komunikadon inter malsamlingvuloj“ (vd. la difinon supre), sed celas al estetikaj kvalitoj (kiel ekzotikeco kaj pseŭdoaŭtentikeco) en artaj verkoj. Interlingvistiko ankaŭ havas la taskon atentigi pri la fakto, ke nia mondo plenas je nesolvitaj problemoj kaj malegalecoj kunligitaj kun lingvaj demandoj. Se la okupo pri ĉiaj konscie kreitaj lingvoj okazas sur la sama ebena, tiu celo fariĝas nekredinda.

3 La stato de Esperanto kiel esplorobjekto

En tiu parto de la prelego ni okupiĝos pri la demando, kiel fartas Esperantologio kiel speciala subdisciplino de Interlingvistiko. Mia elirpunkto por tiu superrigardo estas artikolo de Asya Pereltsvaig, „Esperanto linguistics. State of the art“, published in *Language Problems & Language Planning* 41(2) 2017. La aŭtorino prilumas la evolustaton de Esperantologio en diversaj terenoj, komence laŭ la diversaj niveloj de la lingvosistemo, menciante la sekvajn studojn:⁴

- (1) Morfologio / Gramatiko (Dankova 1997; 2009; Dasgupta 1987, 1989; Fischer 2014; Gledhill 2000; Jansen 1999, 2012, 2013; Schubert 1993, 2015; Wells 1989)

Interesa aspekto estas, ke kelkaj aŭtoro studis Esperanton en la kadro de diversaj gramatikaj skoloj, kiel ekzemple Wim Jansen rilate al *Functional Discourse Grammar*, kio ja havas la avantaĝon, ke ili per tio aŭtomate kaptas la atenton de la adeptoj de tiuj skoloj kaj prezentas Esperanton kiel esplorindan studobjekton.

- (2) Fonologio (Oostendorp 1999; **Dols Salas 2015**)
- (3) Gender (Brosch 2015; Fiedler 2014, 2015; **Fischer 2002, 2003**)
- (4) Tipologio (rilate al etnaj lingvoj) (Charters 2015; Comrie 1996; Jansen 2007, 2008, 2009; Koutny 2015; Lindstedt 2006; Pabst 2014; Parkvall 2010; Sherwood 1982)
- (5) Frazologio (Dasgupta 1993; Fiedler 1999, 2007, 2015; Gledhill 2010, 2014)
- (6) Humuro (Fiedler 1999; Jordan 1988; **Lloancy 1985; Mel'nikov 2008, 2015**)

La disertacio de Marie-Thérèse Lloancy pri la vortkreado de Raymond Schwartz laŭ mia scio ne estis publikigita libroforme. Tiu entrepreno povus esti celo por la estonteco. Ĝi nenion perdis de sia aktualeco kaj gravas por la ĝenerala rekono de Esperanto en la publiko. Homoj, kiuj ne konas la lingvon, laŭ mia sperto senprobleme kredas, ke Esperanto estas taŭga faklingvo; ke ĝi ankaŭ funkcias kiel kreiva komunikilo por lingvoludado apenaŭ imageblas.

Temo, kiu kaptis sciencon atenton kaj ene kaj ekstere de la lingvokomunumo, estas:

- (7) Esperanto kiel denaska lingvo (interalie rilate al kreolaj lingvoj):
(Berdichevsky 2007; Bergen 2001; Corsetti 1993, Corsetti k.a. 2004; Fiedler 2012; Heil 1999; Krägeloh 2009; Lindstedt 2006, 2009; Liu 2001; Parkvall 2008; Versteegh 1993).
- (8) Socilingvistikaj studoj

⁴ La grase presitaj studoj de tiu ĉapitro estas miaj aldonajoj. Ilin enhavas la bibliografio al tiu ĉi teksto. La aliajn listigitajn la leganto trovas en la bibliografio de la artikolo de Pereltsvaig (2017).

(Blanke 1985; Edwards 1994; Fettes 1996; Fiedler 2006; Forster 1982; Gledhill 2014; Jordan 1987; Pool & Grofman 1989; Stocker 1996; Yaguello 2006)

Se ni konsideras la fascinan situacion, kiun socilingvistoj trovas en Esperanto – ke antaŭ pli ol 130 jaroj juna viro kreis lingvon ĉe sia skribotablo, kiu fariĝis plene funkcia komunikilo kun evoluanta komunumo – la studoj menciitaj estas magra rezulto. Feliĉe aldoneblas kelkaj novaj esploroj (**Tonkin 2006; Pietiläinen 2010; Galor & Pietiläinen 2015; Caligaris 2016, Koutny 2010; Stria 2016, 2017, Fians 2018**), kio tamen ne ŝanĝas multon pri la fakto, ke la Esperanto-parolantaro estas nesufiĉe studita temo.

Krome Pereltsvaig mencias studojn pri

(9) Normigado de Esperanto

(Duc Goninaz 2002; Kalocsay & Waringhien 1985; Wennergren 2005; **Dols Salas 2015**), inkluzive de terminologio (W. Blanke 1989, 2008, 2013; Schubert 1993)

Kaj, kun fokuso pri la lernfaciliga (propedeŭtika) efiko de Esperanto,

(10) Lingvolernado

(Corsetti & La Torre 1995; Fantini & Reagan 1992; Fonseca-Greber & Reagan 2008; Symoens 1992; Tellier & Roehr-Brackin 2013; **Brosch & Fiedler 2017**)

Por kompletigi la superrigardon de Pereltsvaig (2017) oni povus aldone mencii la sekvajn terenojn, al kiuj Esperanto kontribuis:

(a) la kampo de minoritataj lingvoj

Esperanto ne estas minoritata lingvo, sed estas interesaj paraleloj rilate al la sintenoj kaj kondukmanieroj inter la parolantoj de minoritataj (endanĝerigitaj, „malgrandaj“) lingvoj kaj Esperanto-parolantoj, pri kiuj **Kimura (2012)** kaj aliaj atentigis. Simile Federico Gobbo kun kolegoj organizas konferencan serion „contested languages“ (kontestitaj lingvoj), en kiu Esperanto havas sian lokon.

(b) Tradukscienco: (1) beletro (Astori 2016; Blanke 1994, 2006; Fiedler 2002; Tonkin 2010), (2) maŝintradukado (Gobbo 2015b; Sadler 1989; Schubert 1993; Witkam 1983, 2006)

(c) la interdisciplina tereno de lingvoekonomiko (kun temoj kiel lingvoj kaj labormerkato; kostoj de lingvoplanado kaj -politiko) (Grin 2005; Gazzola & Wickström 2016; Gazzola et al. 2018).

(d) Pragmatiko (komencoj en studoj pri (5) frazeologio kaj (6) humuro kaj en Koutny 2010); lastatempe: Libert 2013, 2016)

Mi ellasis en tiu superrigardo la kulturhistoriajn studojn, kiuj aperis dum la pasintaj jaroj:

- Garvía (2015), Schor (2015), Kamusella (2015) und Gordin (2015), Feierstein (2017) kaj Anderson & L. de Saussure (2018).

Tiuj aŭtoroj studas planlingvojn ĉefe kiel socihistorian fenomenon, serioze kaj ene de universitataj strukturoj. La dua tago de la simpozio estos dedikita al tiu tereno, precipe la prelego de Roberto Garvía.

Revenante al la studo de Pereltsvaig, indas ĝeti rigardon al la fontoj. Multaj verkoj estas memstaraj libroj forme de disertacioj. Sed ankaŭ fakaj revuoj ludas gravan rolon, inter ili la sekvaj (kun la nombro de bibliografiaj unuoj en la studo de Pereltsvaig en parentezo):

- *Esperantologio/Esperanto Studies* (9) (Ĝi bedaŭrinde ne plu ekzistos, ĉiuj ĝisnunaj 8 kajeroj estas rete alireblaj: <http://www.cb.uu.se/esperanto>)
- *Language Problems & Language Planning* (8) (Ĝi enhavas interlingvistikan sektion, t.e., ĉiam nur parto estas dediĉita al interlingvistiko. Laŭ miaj spertoj, t.e. ekzemple deziroj de kolegoj sendi artikolon, *LPLP* estas malbone alireblaj eĉ por universitatoj.)
- *INDECS* (2015, eld. Tonkin & Poór) (6)
- Publikigaĵoj de „Gesellschaft für Interlinguistik“ („GIL-Beihefte“, ekde 2017: „Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik“) (4)
- Schubert (eld. 1989) (3), Schubert (eld. 2001) (3)

Pereltsvaig ne povis koni la libron „Aliroj al Esperanto“ (eld. Kiselman 2018). Ŝi malatentis la revuon *Język Komunikacja Informacia (JKI)* (eld. de Ilona Koutny k.a. ĉe Adam-Mickiewicz-Universitato Poznań), kiu estas bonege alirebla rete. En la pasintaj jaroj multaj elstaraj studoj interlingvistikaj aperis en ĝi, ekz. de **Bavant (2014)**, **Moret (2016)**, **Puškar (2016)**, **Tuider (2015)**.

Se mi prijuĝu la evolustaton de Esperanto kaj Interlingvistiko laŭ tiu superrigardo kaj miaj ĝeneralaj spertoj, mi dirus, ke ĝi estas elstare bona, se ni konsideras la kondiĉojn, kiujn ni havas. Esploroj pri Esperanto kaj Interlingvistiko estas ĉefe farataj de specialistoj de diversaj (aliaj) fakoj aldone, libervole/honorofice/hobie, elektu vi la ĝustan vorton. La fako ne estas integrita parto de universitataj strukturoj (krom, je certa grado, la esceptoj de Poznań kaj de Amsterdamo eble). Ne ekzistas iu larĝa bazo de studentoj, kiuj ĉiujare finas studadon en tiu fako per scienca laboraĵo (ĉu sur la niveloj de Bachelor aŭ Master, el kiuj eble elkreskas kandidatoj por doktorigaj disertacioj. Sub tiuj kondiĉoj la ekzisto de tiom riĉa esplorkampo Esperanto/Interlingvistiko estas mirige bona rezulto. Kompare al aliaj fakoj tamen la esplorpejzaĝo de Interlingvistiko havas ege vastajn neprilaboritajn kampojn. Laŭ miaj spertoj, se ni restu en lingvistiko, en studoj pri iu ajn temo rilate al la angla aŭ la germana oni bezonas jaron por trovi sian lokon, sian niĉon, breĉon pri kiu esploroj ankoraŭ ne ekzistas aŭ aldonaj indas. Rilate al Esperanto la niĉoj estas grandareaj teritorioj. Pri tiuj, t.e. pri dezirindaj aŭ eĉ necesaj estontaj esplortemoj mi intencas paroli, sed unue mi volas fari ekskurson el alia perspektivo.

4 Rigardo de ekstere

Stimulo por okupiĝi pri tio estis diskuto en „Libera Folio“ post apero de interesa teksto el la plumo de Renato Corsetti en decembro 2017, sub la titolo „Ankaŭ lingvistoj estas homoj“. La temo estis la kelkfoje malĝustaj pritaksoj pri Esperanto aŭ planlingvoj fare de lingvistoj. Inter la multaj komentoj pri tiu teksto estis la sekva, skribita de studento en Usono:

Mi estas studanto pri lingvistiko en Usono kaj povas diri, ke ĉi tie lingvistoj reflekse taksas esperanton iom ridinda afero, kaj opinias ke ĝi ne estas "vera lingvo." Nun estas tamen iuj konataj lingvistoj, kiuj pretas priskribi la esperanton, sed precipe per popularaj libroj, je kiuj ne tute fidus la lingvistaro. Estas ankaŭ probleme, ke tiuj libroj ĝenerale pritraktas esperanton kiel kuriozaĵon de la historio ial nun ŝatatan de nerealisma grupo da "nerdoj." Ofte la e-movado prezentiĝas kiel kortuŝa, inspira

idealismaĵo, sed ne kiel io, al kio aliĝus raciema homo (kaj lingvistoj estas kutime tre raciemaj). Mi tamen sukcesis iom [...]

Mi demandis min, ĉu la situacio estas vere alia en aliaj landoj, ni diru, ekzemple en Germanio. Kiujn ŝancojn havas ordinara studento interesiĝanta pri lingvoj, eble eĉ pri lingvistiko ekscii ion pri Esperanto? Kun la celo eltrovi tion eta analizo de faka literaturo pri lingvistiko kaj socilingvistiko estis kondukita. Temas pri enkondukaj verkoj, paperaj kaj retaj,⁵ atingeblaj en la biblioteko de la Universitato de Leipzig.⁶

Troviĝis entute 129 libroj (82 en la angla, 41 en la germana kaj 7 en aliaj lingvoj). El tiuj 19 libroj (14,7%) enhavas ion pri Esperanto. Detala prezentado de la rezultoj, kion tiuj malmultaj libroj kun referenco al Esperanto enhavas, ne eblas kadre de tiu prelego. Sufiĉu resumi, ke la planlingvo estas prezentata kiel rimedo de egalrajta komunikado (4 libroj), kiu havas regulan strukturon (4) kaj Eŭropecan (aŭ okcidentan) karakteron (4) kaj ke inter ĉiuj projektoj Esperanto estas la plej sukceshava (3).

En du libroj Esperanto estas menciata dum priskribado de specifaj lingvistikaj fenomenoj: En unu libro por klarigi morfemajn alternaĵojn en ĉapitro pri fonologio/fonetiko, en la dua la temo estas la universala gramatiko kaj la gepatraj lernantoj de Esperanto. Malĝustajn asertojn ni nur en unu libro trovis.⁷ En neniu bedaŭrinde Esperanto servas al celo por kiu ĝi laŭ mi precipe taŭgus kaj por kiu mi ne malofte uzas ĝin – kiel modelo de senescepta lingvosistemo por klarigi lingvajn unuojn kaj fenomenojn kiel morfemojn, vortkategoriojn, vortfaradajn principojn, la produktivecon la afiksoj ktp.

Nia analizo de la faka literaturo pri socilingvistiko montris, ke inter 107 enkondukaj verkoj 22 (20%) mencias aŭ traktas Esperanton. Entute do la planlingvo ricevas relative malmulte da scienca atento en la menciitaj fakoj kaj konfirmiĝas la impresoj, ke interlingvistiko ne vere havas ion gravan por kontribui al lingvistiko. Ni konsideru ankaŭ tion, kiam ni nun okupiĝas pri estontaj taskoj de interlingvistika esplorado.

5 Kelkaj pensoj pri strategioj de estonta interlingvistika laboro

5.1 Esperanto kiel uzata lingvo

Kiel anoncote en la enkonduko, laŭ mi tri principoj gvidu interlingvistan esploron. La unua, t.e. la fokuso sur la lingvouzo, rezultas el praktikaj spertoj pri la akcepto de Esperanto en sciencaj rondoj. Ĉiu parolanto de la planlingvo konas la ĝeneralajn reagojn de homoj ĉe mencio de Esperanto: „Esperanto? Mi ne sciis, ke tio ankoraŭ ekzistas.“ Ŝajnas al mi, ke la bildo en la sciencoj inkluzive de lingvistiko estas iom simila. Bone edukitaj homoj kompreneble scias, ke

⁵ Ekzemploj estas: Fasold, Ralph W. and Connor-Linton, Jeff (eds.) (2006) *An Introduction to Language and Linguistics*. Cambridge: Cambridge University Press; O'Grady, William, Archibald, John, Aronoff, Mark and Rees-Miller, Janie (2010) *Contemporary Linguistics: An Introduction*. Boston: Bedford/St. Martin's; Linke, Angelika, Nussbaumer Markus und Portmann, Paul R. (2004) *Studienbuch Linguistik*. (5. erw. Aufl.). Tübingen: Max Niemeyer Verlag; Löffler, Heinrich (1991) *Linguistische Grundlagen – Eine Einführung*. Aarau: Verlag Sauerländer.

⁶ Kun proks. 30000 studentoj, la Universitato de Leipzig estas mezgranda germana universitato. Mi dankas al mia esplor-asistantino, Svenja Freese, kiu ĉefe prizorgis tiun analizon.

⁷ „Throughout the twentieth century, it was taught in schools and universities around the world but did not receive acceptance as an international language.” (Denham, K. & Lobeck, A. [2013] *Linguistics for Everyone. An Introduction*. Boston: Wadsworth, p. 497)

ekzistas tiu lingvo, eble ankaŭ, kia ĝi estas, kiu kreis ĝin. Sed malmultaj scias, ke ĝi estas vere uzata. Ni metu tiun uzon ankaŭ en la centron de niaj esploroj. Lingvistiko hodiaŭ estas uzobazita. Sed kiamaniere Esperanto-parolantoj vere uzas la lingvon, kiel ili prezentas argumentojn, klopodas preventi miskomprenojn, kiamaniere ili negocas enhavojn de vortoj kaj terminoj, reagas en okazo de miskompreno, kion ili faras, kiam mankas leksika unuo, kiel ili riparas komunikadon, ĉu ili uzas aŭ eble evitas idiomaĵojn kaj metaforojn, ĉu entute ili komunikas en iu internacia maniero aŭ simple transprenas siajn konduktajn kaj komunikadajn strategiojn el siaj etnaj lingvoj kaj kulturoj – tio estas ege interesaj demandoj, sed ili ne estas esplorataj en Esperanto.

Cetere, alia aspekto estas kunligita kun tio. Se nia studkampo estas la lingvouzo, la bone konata problemoj kiu faru la esplorojn pri Esperanto ne tre gravas. Mi parolas pri la situacio (priskribita de H. Tonkin, de Jane Edwards k.a.), ke lingvistojn kiuj mem estas Esperanto-parolantoj oni ofte konsideras netaŭgaj aŭ prijuĝaj, dume ke al personoj eksteraj ofte mankas la necesaj specifaj konoj. Etnografie orientitaj studoj estas studoj de ene, de la membroj de la komunumo mem kaj ili devas esti bonaj parolantoj de la lingvo (kp. Hutchby & Wooffitt 2008: 106).

Studoj pri la reala uzo de Esperanto gravas por la pluevoluigo de Interlingvistiko. Ili krome helpas, ke la lingvo estos rimarkata ekstere de la komunumo kiel tio kio ĝi estas – komunikilo praktike aplikata.

5.2 La varieco de Esperanto (inkl. de la diakrona ebena)

Diverseco, do la ekzisto de lingvaj variantoj (de t.n. funkciaj stiloj, kiel ekz. la ĉiutaga lingvo, la faka lingvo) estas karakterizaĵo de lingvoj. Ankaŭ en Esperanto ni spertas, ke poemo kaj universitata prelego diferencas. La unu riĉas je retorikaj figuroj (cetere, tio estas estas bone prilaborita temo, kp. Dahlenburg 2013), la dua je terminoj. Tamen ŝajnas al mi, ke la uzo de Esperanto en la diversaj stilaj funkcioj (inter kiuj kelkaj verŝajne tute ne ekzistas, kiel ekz. la tavolo de oficial-burokrata aŭ jura lingvouzoj) same kiel la parola kaj la skriba uzo de Esperanto ne tiel altgrade distingiĝas kiel en etnolingvoj. Aliflanke de tempo al tempo oni aŭdas aŭ legas, ke Esperanto posedas propran junularan lingvaĵon aŭ ĵargonon. Esploroj pri tiuj fenomenoj laŭ mi tute ne ekzistas, sed necesas.

Speciale gravas laŭ mi la varieco sur la diakrona ebena. Detlev Blanke (2000) priskribis la evoluojn de planlingva projekto al plene funkcia lingvo surbaze de 28 kriterioj (de „manuskripto“ kiel la unua etapo ĝis lingvoŝanĝiĝo kiel la plej alta). Do Esperanto estas lingvo, ĉar ĝi evoluas kaj posedas historian (aŭ diakronan) ebenon. Por multaj lingvistoj vere tio estas decida kriterio de lingveco. Stewart (1962, 1968) ekzemple proponis influriĉan tipologion por socilingvistika klasifikado de lingvoj. Liaj kriterioj estas *standardization* (normigado), *autonomy* (aŭtonomeco), *historicity* (historieco) kaj *vitality* (laŭ lia difino 1968 p. 536: „use of the linguistic system by an unisolated community of native speakers“ (indiĝeneco), kiujn li traktas kiel binarajn karakterizaĵojn por distingi *standard* (normlingvo) de *vernacular* (vulgara l./popollingvo), *dialect* (dialekto), *creole* (kreollingvo), *pidgin* (piĝino), *classical* (klasika l.) and *artificial language* (planlingvo). La planlingvo laŭ li posedas la karakterizaĵojn de normigado kaj aŭtonomeco, sed ĝi ne estas plena lingvo, ĉar mankas al ĝi la ecoj de historieco kaj indiĝeneco – argumento, kiu estas ripetata ĝis la hodiaŭa tago dum diskutoj pri planlingvoj (kp. Ekz. Seidlhofer 2012).

Kvankam la denaskuloj de Esperanto ne estas kompareblaj al gepatraj parolantoj de etnaj lingvoj (Fiedler 2012), pri tiu temo ekzistas esploroj, kiel la superrigardo en 3 montris. Rilate al kriterio de historieco ili mankas tamen, kvankam post 130 jaroj da komunika historio laŭ mi ne estas duboj, ke ekzistas diakrona ebena de Esperanto. Konataj al mi estas nur tri studoj: germanlingva disertacio de Benoît Phillipe (1991), studo de Detlev Blanke (2010) kaj artikolo de Claude Piron (1989). Inter tiuj la laste menciita, t.e. la plej malnova estas verŝajne la plej grava, ĉar ĝi baziĝas sur datumoj. Piron montras trajtojn de la evoluo de Esperanto sur diversaj ebenaĵoj de la lingvosistemo per ekzemploj el la fakta lingvouzo (kiujn li kolektis dum kongresoj aŭ en la literaturo).

Per tiu ĉi rimarko mi venas al konkludo, kiu rezultas el 5.1 kaj 5.2. Se Interlingvistiko/Esperantologio volas kontribui al lingvistikaj esploroj, se ni volas esti akceptita fako, ni ankaŭ devas uzi la rimedojn kaj metodojn de lingvistiko. Moderna lingvistiko estas uzobazita, ĝi prenas datumojn de fakta lingvouzo kiel elirpunkton. Kion ni do bezonas por nia laboro estas pli bonaj korpusoj. La nunaj, mi rilatas ĉefe al tekstaro.com,⁸ estas bona komenco, kiu lastatempe fariĝis pli kaj pli alirebla, sed ĝi estas tute ne sufiĉe ampleksa. Diakronaj studoj pri Esperanto, kiuj ne nur estas necesaj, sed ankaŭ fascinaj, sur ĝia bazo nuntempe ege malfacilas. Se temas, por preni ekzemplon, pri la evoluo de frazeologio (Kiam oni parolis pri *kavaliro de la verda stelo*? Kiam venis la esprimo *Laste, sed ne balaste* en la lingvon? Ĉu la signifo de *fosi sian sulkon* estas hodiaŭ ankoraŭ la sama kiel en 1908?), la servoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko (serĉilo ANNO) por la unuaj jardekoj de Esperanto pli taŭgas. Kial la Esperanto-korpuso ebligas aliron al nur du revuoj kaj nur inter la jaroj 1996 kaj 2003? Kie estas la faka literaturo en Tekstaro? Krome bezonatas parola korpuso, kies bazo povus esti i.a. la ĉiujaraj Universalaj Kongresoj, dum kiuj lingvouzo manifestiĝas en plej diversaj formoj – dum popular-sciencaj prelegoj, dum debatoj, dum kafopaŭzaj konversaciaĵoj, dum ekskursoj ktp.

5.3 Esperanto kiel unu lingvo aŭ fako inter aliaj

Tiu tria aspekto estas malpli temo ol strategio. Libroj pri planlingvoj aŭ Esperanto (mi menciis la specialan numeron de *INDECS* kaj *Aliroj al Esperanto* en 3) estas elstare grava afero. Ili donas bonan superrigardon pri la fenomeno, sed ili estas rigardataj kaj atentataj antaŭ ĉio de homoj, kiuj jam interesiĝas pri la temo. Almenaŭ same gravas publikigaĵoj, kiel konferencaj kontribuoj, ĉapitroj de libroj ktp. pri Esperanto en kolektaĵoj pri iu ajn temo de lingvistika intereso (morfologio, metaforoj, salutmanieroj, terminologio, genro, gestoj), kiu estas traktata en diversaj lingvoj. Studado de Esperanto inter tiuj kontribuajoj en libro aŭ dum konferenco montras, ke temas pri serioza studobjekto, kiu indas esti esplorata.

Tio ĝustas por ĉiuj fakoj. Javier Alcalde (2015) verkis studon pri la temo lingva justeco, kiu enhavis la ĉapitrojn pri politika filozofio, pri ekonomiko, socilingvistiko/ekolingvistiko kaj interlingvistiko/esperantologio kaj juro. Do interlingvistiko aperas kiel unu fako inter aliaj, kiel fako, kiu havas ion por kontribui al la temo lingva justeco. La mesaĝo estas, ke fakulo alstrebante kompletan scion pri la temo lingva justeco ne malatentu Esperanton kaj Interlingvistikon.

⁸ Pri kromaj korpusoj de Esperanto vd. Normantas (2013), Fiedler & Quasthoff (2014) kaj Fiedler (2016).

Same en lingvistiko: Estas en Germanio serio de Manlibroj pri Lingvistiko kaj Komunika Scienco (*Handbooks of Linguistics and Communication Science*), kaj kelkaj inter ili enhavas ĉapitron pri Esperanto/planlingvoj.

- Vol. 3 (*Soziolingvistik/ Sociolinguistics*), Part 1(1987): Alicja Sakaguchi, Welthilfssprachen, pp. 365-370; Part 2 (1988): Pierre Janton, Plans for an International Language, pp. 1679-1687;
- Vol. 5 (*Wörterbücher/Dictionaries*), Part 3 (1991): Reinhard Haupenthal, Lexikographie der Plansprachen, pp. 3120-3137);
- Vol. 7 (*Sprachphilosophie/ Philosophy of Language*), Part 2 (1996): Vivian Salmon, The Universal Language Problem, pp. 916-928;
- Vol. 12 (*Kontaktlinguistik/Contact Linguistics*), Part 1(1996): Otto Back, Plansprachen, pp. 881-887;
- Vol. 13 (*Semiotik/Semiotics*), Part 4 (2004): Peter Mühlhäusler, Universal Languages and Language Planning, pp.3614-3634.
- Vol. 14 (*Fachsprachen/Languages for Special Purposes*), Part 1 (1998): Detlev Blanke/Wera Blanke, Plansprachen als Fachsprachen, pp. 875-880;
- Vol. 17 (*Morphologie/Morphology*), Part 2 (2004): Detlev Blanke, Plansprachen, pp. 1563-1573.
- Vol. 18 (*Geschichte der Sprachwissenschaften/History of the Language Sciences*), Part 1 (2000): Jaap Maat/David Cram, Universal Language Schemes in the 17th Century, pp. 1030-1043;
- Vol. 20 (*Sprachtypologie und sprachliche Universalien/ Language Typology and Language Universals*), Part 1 (2001): Heiner Böhmer, Künstliche Sprachen und Universalisprachen, pp. 85-94.
- Vol. 21 (*Lexikologie/Lexicology*), Part 2 (2005): Detlev Blanke, Wortschatzbesonderheiten in Plansprachen, pp. 1101-1107.
- [Vol. 28 (*Phraseologie/Phraseology*), Part 2 (2007): Sabine Fiedler, Phraseology in Planned Languages, pp. 779-788.
- Vol. 40 (*Word formation*), Part 3 (2015): Klaus Schubert, Word Formation and Planned Languages, pp. 2210-2225.

Same ekzistas serio da libroj kun la titolo *Gender across Languages* kun enhave kaj strukture kompareblaj ĉapitroj pri diversaj lingvoj. La kvara volumo, dediĉita pli al la „malgrandaj“ lingvoj enhavas – krom ĉapitro pri ekz. la kurda, pri Igbo kaj la svisgermana – kontribuojn pri Esperanto. Lingvisto okupiĝanta pri tiu temo kaj konanta sian fakan literaturon verŝajne ne dubas, ke Esperanto estas vere uzata lingvo.

Rilate al tiu strategio la kondiĉoj de interlingvistika laboro priskribitaj antaŭe ne nepre estas malavantaĝo. Se esploroj en tiu fako estas farataj ĉefe de specialistoj de aliaj fakoj, tiuj personoj ja havas la ŝancon enmeti ion interlingvistikan en la esplorplanojn aŭ eĉ la instruprogramojn de siaj fakoj. Se mi rajtas ankoraŭfoje reveni al GIL, la kursoj kun interlingvistikaj enhavoj ĉe germanaj universitatoj proponataj de kelkaj GIL-membroj ekzakte tion montras.

- (a) Seminario „Sprache und Ökonomie“ (lingvo kaj ekonomio) (ekde 2006 Humboldt-Universitato Berlin/Budapest; Bengt-Arne Wickström)
- (b) Prelego „Basque and Esperanto. What we can learn from comparing the incomparable“ (2012 Universitato de Liverpool [Buchanan] Wim Jansen)

- (c) Intensa seminario „Sprachplanung und Plansprachen“ (lingvoplando kaj planlingvoj) (2013 Universität Duisburg-Essen, Marcos Cramer; surbaze de „Language Planning and Social Change“ de Robert Cooper [1989] kaj „Internationale Plansprachen“ de Detlev Blanke)
- (d) Seminario "Plansprachen und das Thema Frieden" (planlingvoj kaj la temo paco) (2014, Universitato de Rostock, Cornelia Mannewitz)
- (e) Seminario „International communication – international languages“ (ekz. 2012 Universitato de Poznano, Ilona Koutny kaj Mike Farris)
- (f) Seminario "From Klingon Morphology to English Syntax: Constructed Languages in Teaching Contexts" (2016/17 Universitato Frankfurt/M.; Judith Bündgens-Kosten & Manfred Sailer)
- (g) Prelego “Sprache und Gesellschaft in Europa” [Lingvo kaj socio en Eŭropo] kaj prelego “Sprachliche Dynamiken” [Lingvaj dinamikoj; pri diversaj eblecoj de interlingva komunikado] (2017 Sophia-Universitato Tokyo; Chr. Goro Kimuro)
- (h) Modulo „International linguistic communication – Challenges to politics and society“: prelego „Linguistic Communication in Europe: Debates and possible solutions“ + seminario „English in a Global Context“ / „Language & Mobility“ + lingvokurso Esperanto (2016/17 kaj 2017/18 Universitato de Leipzig; Sabine Fiedler kaj Cyril Robert Brosch)

Kiel eroj de la normalaj universitataj studprogramoj tiuj kursoj ĝuas agnoskon kaj alportas ECTS-poentojn al la partoprenantoj, kio gravas en la nuna Bolonja studsistemo en Eŭropo. Do entute temas pri klopodoj fari Esperanton parto de io alia. Estas pliaj lastatempaj ekzemploj de tiu principo. Mi menciis la serion de konferenco pri kontestitaj lingvoj, kiun F. Gobbo kunorganizas (kun kvar kontribuoj pri Esperanto dum la konferenco en majo 2018 en Amsterdamo). Mi pensas pri simpozio pri Lingva Justeco en Berlino (2015, organizita de M. Gazzola & B. Wickström) kaj Multlingveco en Amsterdam en 2017, ambaŭ kun kontribuo pri Esperanto en la programo. Al simila direkto iras la Interlingvistikaj Simpozioj en Poznań, kiuj kun prelegoj en la angla, en Esperanto kaj en la pola alparolas diversajn celgrupojn.

En tiuj konferencoj kaj en la seminarioj kaj prelegoj antaŭe listigitaj Esperanto ludas eble marĝenan rolon, sed rolon, kaj estas akceptata kaj prenata serioze. Tute certe tiuj aferoj helpas malpligrandigi antaŭjuĝojn en la scienco rilate Esperanton.

Fine mi ŝatas mencii la Eŭropan esplorprojekton „Movebleco kaj Inkluziveco en Multlingva Eŭropo“ (MIME) (www.mime-project.org), en kies kadro lingvafrankaĵoj estas esplorataj, inter tiuj Esperanto. En ĝi la temo multlingveco estas studata de sciencistojn el entute 22 universitatoj kaj esplorinstitutoj. La interdisciplinan karakteron bone ilustras la sekva ĉarrada grafikaĵo:



Oni vidas, ke en tiu projekto reprezentantoj de plej diversaj sciencoj kunlaboras: de sociologio, filozofio, pedagogio, politika scienco, ekonomiko, jurscienco, lingvistiko k.a. Entute sep esploristoj en la projekto estas Esperanto-parolantaj (Cyril Robert Brosch, Mark Fettes, Sabine Fiedler, Michele Gazzola, Federico Gobbo, [Ida Stria], Bengt-Arne Wickström). Ja ne estas surprizo, ke homoj kiuj okupiĝas pri temoj kiel lingva egaleco kaj multlingveco ankaŭ interesiĝas pri Esperanto. La fakto, ke ili dum konferencaj paŭzoj vaste uzis la lingvon inter si, ne restis nerimarkita de la kolegoj kaj certe kontribuis al ĝenerale malferma sinteno al studoj pri la planlingvo.

Studoj pri Esperanto estas kondukataj laŭlonge de la verda spoko de la modelo, kie esploristoj okupiĝas pri lingva perado (*mediation*) en situacioj, en kiuj homoj ne povas uzi la propran lingvon kaj ĉerpas el strategioj kiel tradukado, teknikaj tradukhelpiloj (ekz. google translate) (*language technologies and industries*), ricevaj lingvokonj surbaze de lingvosimilecoj (ĉefe ene de lingvofamilioj, kiel la slavaj, latinidaj k.a. (*intercomprehension*) kaj lingvafrankaoj (*Lingua Franca*). En diversaj studoj, ekz. en la terenoj de migrado kaj studenta interŝanĝo, ĉiam ĉiuj kvar strategioj estas analizataj por eltrovi ties avantaĝojn kaj malavantaĝojn en kompareblaj situacioj. Se temas pri la laste menciita tekniko, la angla staras en la centro, kiu estas la nuntempe plej ofte uzata lingvafrankao. Aldone, Cyril Brosch kaj mi studas la uzon de Esperanto, ankaŭ pro komparaj celoj, t.e. por eltrovi, ĉu la karakterizaĵoj, kiujn oni atribuas al lingvafrankaoj surbaze de esploroj pri la angla, validas nur por tiu lingvoj aŭ por lingvofrankaoj ĝenerale.

MIME do ne estas projekto pri Esperanto. En la komenca priskribo por la Eŭropa Komisiono tiu vorto eĉ ne aperas. Temas pri ŝanco enplekti la planlingvon en sian studadon de lingvofrankaĵoj, kiun la du esploristoj eluzis. La esploroj estas plene agnoskataj kiel integra parto de la projekto kaj kun sufiĉe granda sukceso, se ni konsideras la kvar sciencajn publikigaĵojn ĉi-rilatajn ĝis nun (Brosch & Fiedler 2017; Fiedler 2017; Fiedler & Brosch 2018; Brosch 2018). Aldone kiel rezulto de la projekto MIME antaŭ nelonge aperis lingvopolitika gvidilo *Vademecum* (senkoste alirebla sub www.mime-project.org/vademecum) por politikistoj, ŝtataflicistoj kaj ĵurnalistoj kun 72 demandoj kaj respondoj ĉirkaŭ la temo multlingveco. N-ro 57 (Should a planned language such as Esperanto be promoted as an international language?) donas rektan respondon al unu al la demandoj de la ĉi-jara Nitobe-simpozio forme de rekomendo: "Planned languages and interlinguistics (the study of planned languages) should be established as fields of teaching and research at universities." (p. 151).

6 Finaj rimarkoj

Mi ne rigardis kiel mian taskon en tiu prelego prezenti multajn novajn proprajn esplorrezultojn, sed doni bazon aŭ instigon por diskuto pri la temo de la ĉi-jara Nitobe-simpozio „Esperanto kaj Universitato“. Kion mi volis montri estas, ke Esperanto havas sian lokon en la scienca mondo kaj interlingvistiko estas la disciplino, kiu studas kaj studu ĝin.

La ĝisnuna stato de la evoluo montras, ke multon oni atingis (precipe se konsideri la laborkondiĉojn), sed ankaŭ ke ekzistas multaj tute neprilaboritaj kaj ne sufiĉe prilaboritaj kampoj en la interlingvistika pejzaĝo. Laŭ mi ni studu Esperanton kiel lingvon en uzado kaj kiel lingvon, kiu ŝanĝiĝas.

Esperanto kaj entute planlingvoj nuntempe ne plu estas rigardataj la solvoj de iu lingva problemoj kiel en 1921, kiam Inazo Nitobe verkis sian raporton por la Ligo de Nacioj. En la dua duono de la 20-a jarcento ĉefe la angla fariĝis la ilo de internacia komunikado. Tio malfaciligas la pozicion de Interlingvistiko en la scienca mondo. Esperanto estas tamen fakto, socilingvistika realaĵo, lingva fenomeno, kiu indas kaj endas esti esplorata.

En nova situacio oni serĉu novajn vojojn kaj strategiojn. Interlingvistiko montru, ke studante Esperanton kaj planlingvojn ĝi havas ion por kontribui al aliaj fakoj (kiel lingvistiko, lingvoplanado, tradukado, komunikaj sciencoj, la studoj pri minoritataj lingvoj, temoj kiel multlingveco, lingva justeco kaj aliaj fakoj). Tiu principo de sinenmeto en la ĝeneralan sciencan pejzaĝon validas kaj por esplorado kaj instruado.

Parte interlingvistoj jam estas sur bona vojo rilate al la principo esplori Esperanton kune kun aliaj lingvoj kaj temoj kaj eluzi por tio la strukturojn kaj rimedojn de universitataj kaj Eŭropaj programoj. La problemoj kiujn oni renkontas ĉe tio, ne konduku interlingvistikon al forturno for de la vera studobjekto al pli populara kaj pli facile vendebla kiel la t.n. Holivudaj lingvoj.

Literaturo

Alcalde, Javier (2015): Linguistic Justice: An Interdisciplinary Overview of the Literature (July 1, 2015).

Available at SSRN: <http://ssrn.com/abstract=2630104> A'dam Multiling Working Paper #3

Anderson, Stephen R. & Louis de Saussure (2018) (eds.): René de Saussure and the Theory of Word formation (Classics in Linguistics 6). Language science press.

Astori, Davide (2016): Le traduzioni de „Pinocchio“: Come si è evoluto l’esperanto tra il 1930 e il 2003. En: Gobbo, Federico (Ed.): *Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti*. New York: Mondial, 150-161.

Baudeau de Courtenay, Jan N. (1908): O języku pomocniczym międzynarodowym. <https://polona.pl/item/o-jezyku-pomocniczym-miedzynarodowym-odczyt-publiczny-wygloszony-w-warszawie-5-maja,MTEzOTE/1/#info:metadata>.

Bavant, Marc (2014): Resultative aspect and diathesis en Esperanto. In: *Język Komunikacja Informacja* 9, 109-132.

Blanke, Detlev (1985): *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie-Verlag.

Blanke, Detlev (1994): Translation bei Plansprachen – am Beispiel des Esperanto. In: *TextconText* 9 (3-4), 209-224.

Blanke, Detlev (2000): Vom Entwurf zur Sprache. In: Schubert, Klaus (ed.): *Planned Languages: From Concept to Reality*. Hogeschool voor Wetenschap & Kunst, 37-89.

Blanke, Detlev (2006): Kap. IV. Translationswissenschaftliche Aspekte von Plansprachen. In: Blanke, Detlev: *Interlinguistische Beiträge*. Frankfurt/M.: Peter Lang, 287-330.

Blanke, Detlev (2010): Sprachwandel im Esperanto – gezeigt an Beispielen aus der Lexik. In: Reinke, Kristin & Sinner, Carsten (Hrsg.): *Sprache als Spiegel der Gesellschaft*. München: peniope, 51-77.

Blanke, Detlev (2018): Interlingvistika alirol. En: Kiselman, Christer (ed.): *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice: KAVA-PECH, 25-51.

Blanke, Wera (2013): Pri terminologia laboro en Esperanto. Elektitaj publikaĵoj. New York: Mondial.

Brosch, Cyril 2018. Esperanto als Mittlersprache bei längerfristiger Mobilität. In: Fiedler & Brosch (eds.) *Flucht, Exil, Migration – Sprachliche Herausforderungen*. Leipzig: Leipziger, 69–90.

Brosch, Cyril & Fiedler, Sabine (2017): Der spezifische Beitrag des Esperanto zum propädeutischen Effekt beim Fremdsprachenlernen (mit Schwerpunkt auf der Erwachsenenphase). *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik* 2017, 11-38.

Caligaris, Irene (2016): „Una lingua per tutti, una lingua di nessun paese“: una ricerca sul campo sulle identità esperantiste. ariccia: aracne editrice. (Esperanto: Castilari Presentazione IKE Frascati 2016 rev2.pdf)

Dahlenburg, Till-Dietrich (2013): *Figuroj retorikaj en Beletro Esperanta*. New York: Mondial.

Dols Salas, Nikolau (2015): Diversity, competence and standardisation in Esperanto: hints and questions. *Język Komunikacja Informacja* 10, 63-84.

Feierstein, Ruth Liliana (2017): „Esperanto: Sprache und Utopie“. Antrittsvorlesung an der Humboldt-Universität zu Berlin.

Fians, Guilherme (2018): La Kosmopolito kaj la Aliulo: Historiaj konsideroj pri diferenco kaj diverseco laŭ la vidpunkto de esperantistoj. En: Gotoo, Hitosi et al. (red.): *En la mondon venis nova lingvo. Festlibro por a 75-a naskiĝtago de Ulrich Lins*. New York: Mondial, 475-495.

Fiedler, Sabine (2002): Plansprache und Translation: Empirische Untersuchungen zu Übersetzungen ins (und aus dem) Esperanto. In: Zybatow, Lew N. (Hrsg.): *Translation zwischen Theorie und Praxis*. Frankfurt/M.: Peter Lang, 281-305.

Fiedler, Sabine (2008a): Interlinguistics and Esperanto studies at universities. Experience at the University of Leipzig“. *Language Problems & Language Planning*. 32/3 (2008), 269-279.

Fiedler, Sabine (2008b): Interlingvistiko/esperantologio kiel fako en universitatoj – spertoj el Leipzig. *Informilo por Interlingvistoj*, 2-25.

Fiedler, Sabine (2011): Literarische Spracherfindungen aus interlinguistischer Sicht: die englischsprachigen Autoren J. Swift, G. Orwell und J.R.R. Tolkien und ihre fiktionalen Sprachen. In: Fiedler, Sabine (Hrsg.) *Spracherfindung und ihre Ziele (Beiträge der 20. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 26.-28. November 2010. Interlinguistische Informationen Beiheft 18)*. Berlin: GIL, 9-31.

Fiedler, Sabine (2012): The Esperanto denaskulo: The status of the native speaker of Esperanto within and beyond the planned language community.“ *Language Problems & Language Planning* 36 (1), 69-84.

Fiedler, Sabine (2016): Oftecvortaroj por Esperanto. En: Gobbo, Federico (Ed.): *Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti*. New York: Mondial, 136-149.

Fiedler, Sabine (2017): Lingua-franca-Kommunikation – wirklich ein Fall des Let-it-pass?“. *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik* 2017. 57–71.

Fiedler, Sabine & Quasthoff, Uwe (2014): Word forms and their frequencies. In: Frequency Dictionary Esperanto/Oftecvortaro de Esperanto. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag, 1-11.

Fiedler, Sabine & Brosch, Cyril (2018). Esperanto – a lingua franca in use. A case study on an educational NGO. *Language Problems & Language Planning* 42(2). 195–221.

Fiedler, Sabine & Brosch, Cyril (2018) 57: Should a planned language such as Esperanto be promoted as an international language? In: Grin, François (ed.) *The MIME Vademecum*. Grandson, Switzerland: Artgraphic Carvin SA.

Fischer, Rudolf-Josef (2002): Das Pronominalsystem in Esperanto – noch sexusinklusiv? In: *Plansprachen und ihre Gemeinschaften. Beiträge der 11. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23.-25. November 2001 in Berlin*, ed. Blanke, Detlev (*Interlinguistische Informationen Beiheft* 8). Berlin: GIL, 86-106.

- Fischer, Rudolf-Josef (2003): Sexusneutrale und sexusindizierende Bezeichnungen für Lebewesen. In: *Plansprachen und elektronische Medien. Beiträge der 12. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 6.-8. Dezember 2002 in Berlin*, ed. Blanke, Detlev (*Interlinguistische Informationen Beiheft 8*). Berlin: GIL, 110-149.
- Galor, Zbigniew & Pietiläinen, Jukka (2015): *UEA en konscio de esperantistoj*. Dobřichovice: KAVA-PECH.
- Garvía, Roberto (2015): *Esperanto and Its Rivals: The Struggle for an International Language*. University of Pennsylvania Press, Philadelphia.
- Hutchby, Ian & Wooffitt, Robin (2008): *Conversational Analysis: Principles, Practices and Applications*. Polity Press, Oxford.
- Kiselman, Christer (2018): *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice: KAVA-PECH.
- Gazzola, Michele, Bengt-Arne Wickström (2016) (eds.): *The Economics of Language Policy* MIT Press, Cambridge and London.
- Gazzola, Michele, Templin, Torsten & Wickström, Bengt-Arne (2018 forthcoming) (eds.): *Language Policy and Linguistic Justice. Economic, Philosophical and Sociolinguistic Approaches*. Heidelberg: Springer
- Gobbo, Federico (2015a): La holivudaj planlingvoj. *Esperanto* 108, 112-113.
- Gobbo, Federico (2015b): Machine Translation as a complex system: The role of Esperanto. *INDECS Special Issue: The Phenomenon of Esperanto* (ed. H. Tonkin & V. Poór), 264-274.
- Gordin, Michael D. (2015): *Scientific Babel: How science was done before and after global English*. University of Chicago Press, Chicago.
- Grin, François (2005): L'enseignement des langues étrangères comme politique publique. <http://www.ladocumentationfrancaise.fr/rapports-publics/054000678-l-enseignement-deslangues-etrangeres-comme-politique-publique>,
- Kamusella, Tomasz (2015): *Creating Languages in Central Europe During the Last Millenium*. Basingstoke: Palgrave Macmillan.
- Kimura, Goro Christoph (2012): Esperanto and minority languages: A sociolinguistic comparison. *Language Problems & Language Planning* 26 (2), pp. 167-181.
- Koutny, Ilona (2010): Esperantlingva bildo de la mondo. En: Detlev Blanke & Ulrich Lins (red.): *La Arto Labori Kune*. Roterdamo: UEA, 290-305.
- Libert, Alan R. (2013): What can pragmaticists learn from studying artificial languages? In: Capone, Alessandro, Piparo, Franco L. & Carapezza, M. (eds.). *Perspectives on Linguistic Pragmatics*. Heidelberg: Springer, 397-432.
- Libert, Alan R. (2016). The Pragmatics of Indirect Discourse in Artificial Language. In: Capone, Alessandro, Kiefer, Ferenc & Piparo, Franco L. (eds.). *Indirect Reports and*

Pragmatics. Interdisciplinary Studies. Heidelberg: Springer, 621-630.

Lloancy, Marie-Thérèse (1985): Esperanto et jeu de mots dans l'œuvre de Raymond Shwartz (1894-1973) (Dissertacio). Paris: Université de Paris V (Microkartetoj).

McElvenny, James (2018): *Language and Meaning in the Age of Modernism. C.K. Ogden and his Contemporaries*. Edinburgh: University Press.

Mel'nikov, Aleksandr S. (2008): *Vortludoj kaj luda komunikado en Esperanto*. San Marino et al.: la aŭtoro.

Mel'nikov, Aleksandr S. (2015): *Gvidlibro tra Esperantio*. Rostov-na-Donu: Izd. Minitype.

Moret, Sébastien (2016): Linguistics and ideology: The soviet discourse on a common language. In: *Język Komunikacja Informacja* 11, 183-194.

Normantas, Vilius (2013): Sources of text for Esperanto corpora. *Esperantologio / Esperanto Studies* 6, 109-128.

Okrent, Arika (2009): *In the Land of Invented Languages*. New York: Spiegel & Grau.

Pereltsvaig, Asya (2017): Esperanto linguistics. State of the art. In: *Language Problems & Language Planning* 41(2) 2017, 168-191.

Philippe, Benoît (1991): Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto. Konstanz: Hartung-Gorre.

Pietiläinen, Jukka (2010): Plurlingvismo kaj Esperanto. Ideologia ŝanĝiĝo en la Esperanto-movado. En: Detlev Blanke & Ulrich Lins (red.): *La Arto Labori Kune*. Roterdamo: UEA, 781-792.

Piron, Claude (1989): A few notes on the evolution of Esperanto. In: Schubert, Klaus (ed.), 129-142.

Puškar, Krunoslav (2016): Language planning and planned language: the case of Esperanto. *Język Komunikacja Informacja* 11, 160-182.

Sadler, Victor (1989): *Knowledge-driven terminography for machine translation*. In: Schubert, Klaus (ed.), 311-335.

Sakaguchi, Alicja (1998): *Interlinguistik. Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden*. Frankfurt/M.: Peter Lang.

Schor, Esther (2015): *Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language*. Metropolitan Books & Henry Holt, New York, 2015.

Schubert, Klaus (1989): Interlinguistics – ist aims, ist achievements, and ist place in language science. In: Schubert, Klaus (ed.), 7-44.

Schuber, Klaus (1989) (ed.): *Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages*. Berlin/New York: de Gruyter.

Schubert, Klaus (1993): Semantic Compositionality: Esperanto Word Formation for Language Technology. *Linguistics* 31(2), 311-365.

Seidlhofer, Barbara (2012): *Understanding English as a Lingua Franca*. Oxford: OUP.

Stewart, William A. (1962): An Outline of Linguistic Typology for Describing Multilingualism. In: Rice, F.A. (ed.): *Study of the Role of Second Languages in Asia, Africa and Latin America*. Washington: Center for Applied Linguistics, 15-25.

Stewart, William A. (1968): A Sociolinguistic Typology for Describing National Multilingualism. In: Fishman, Joshua A: *Readings in the Sociology of Language*. The Hague: Mouton, 531-545.

Stria, Ida (2016): Inventing languages, inventing worlds. Towards a linguistic worldview for artificial languages. Poznań: Wydział neofilologii UaM w Poznaniu.

Stria, Ida (2017): Language attitudes among Esperanto speakers. In: *Język Komunikacja Informacja* 12, 146-158.

Tauli, Valter (1968): A sociolinguistic typology for describing national multilingualism. In: Fishman, Josua A. (ed.) *Readings in the Sociology of Languages*. The Hague/Paris, 531–545.

Tonkin, Humphrey (2006): *Lingvo kaj Popolo*. Roterdamo: UEA.

Tonkin, Humphrey (2010): The semantics of invention: Translation into Esperanto. In: Humphrey Tonkin & Maria Exposito Frank (eds): *The Translator as Mediator of Cultures*. Amsterdam: Benjamins, 169-190.

Tonkin, Humphrey (2015): Language Planning and Planned Languages: How Can Planned Languages Inform Language Planning? In: *INDECS Special Issue: The Phenomenon of Esperanto* (eld. H. Tonkin & V. Poór), 193-199.

Tuidler, Bernhard (2015): La kolekto por planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Historio, havaĵo kaj esplorebloj. *Język Komunikacja Informacja* 10, 184-195.

Witkam, Toon (1983): *Distributed Language Translation. Feasibility Study of a Multilingual Facility for Videotex Information Networks*. Internal document, BSO, Utrecht.

Witkam, Toon (2006): *History and Heritage of the DLT (Distributed Language Translation) Project*. Private publication.